

Aùtuna kunveno en Béziers (24/9)

En kursivoj postkunvenaj aldonajoj, novaĵoj .

Malgraù la timoj, ke partoprenos malmultaj homoj pro malfrua informado, venis 23 geesperantistoj . La prezidanto, Jean Hénin, bonvenigis çiujn, speciale Ges. Bouman kaj Garden, kiuj vivas parte de la jaro en nia regiono kaj senkulpigis plurajn personojn inter kiuj Lucette Négron, nia kasistino, pro lastmomenta sanproblemo, Georges Gonthier pro samdata « tago de malfermitaj pordoj » en la MJC de Lunel, ankaù Jeanne Bès, Josée Boccadifuoco, Fernande Terral .

Okazis de post nia kunveno en Lunel

-la staĝo en Batipaume : bona sukceso kaj amika etoso (en 2006 la staĝo disvolviĝos de la 7a ĝis la 14a de junio), -jarfina tago kaj forumo en Campagnan : SFS raportis pri ili ; ni gratulas Gilbert kaj Marité . Departementa konsilanto petis la sendon de dosiero pri E^e. Ni pripensas la enhavon de tia dosiero kaj atendos la aperon de novaj informiloj çe France-espéranto por kompletigi . *Al la dosiero ni povos aldoni la mocion poresperantan de la departementa konsilantaro de Pas-de-Calais kaj partojn de la raporto Grin .*

-diversaj renkontoj, kiujn partoprenis niaj federaciaĵoj : Bouresse, Plouézec, Greziljono...

-busvojaĝo al la Universala Kongreso de Vilno (Litovio) : partoprenis 40 geesperantistoj, el diversaj regionoj ; ĝi disvolviĝis en amika etoso. Spicis ĝin kelkaj surprizoj, speciale enrompanta ŝtelo en Pollando . JH cirkuligas fotojn pri la vojaĝo kaj la UK . Dum la Z-tago en Béziers oni raportos pli detale kaj bilde pri tiu preskaù 6000kilometra « ekspedicio » . En « E^e-Info » estas tri paĝoj pri Vilno, speciale tutpaĝa humura bildrakonto pri la vojaĝo (tiu numero estas ricevebla kontraù 2^e, sendkostoj inkluzivitaj . Sin turni al Ges. Bernard, 48210 Mas St Chély). Çiuj estis favore impresitaj de la etoso de la UK, bone organizita .

-Line Maurel vojaĝis al Vjetnamio kaj anticipe kontaktis tieajn esperantistojn sed malfeliçe ne ricevis respondojn -la semajno de Sète, kiu kontentige disvolviĝis; raporteto aperos en SFS .

-komitatkunvenoj de E^e-France en Parizo : GG partoprenis la junian sed ne la septembran (fakte ankaù la 24an de septembro !) . Nova skipo eklaboras en E^e-France. Ĝi pripensas novajn informilojn . « Okazas » malaperos; informoj estos en LME (Le Monde de l'Espéranto), espereble ankoraù aktualaj .

-nova albumo « Gastono Lafuŝo », eldonita de JEFO ; ni transportis 200 ekzemplerojn al Vilno kaj vendas kelkajn hodiaù je tre favora prezo . Pro mallongaj anekdotoj, ĝi estas uzebla por ilustraj kursojn .

E^e-Info aperas regule . Francis Bernard provas konigi la diversajn E^e-asociojn al francparolantoj kaj novaj esperantistoj .

Septembraj rendevuoj

Okazis/os forumoj de asocioj en Béziers, Montpellier, Lunel, La Canourgue, Paulhan, (Perpignan en januaro ?) . Bonaj okazoj por informi pri esperanto . Ni ne atendu tujajn aliĝojn al kursoj, ktp . JH memorigas, ke niaj standoj ne estas nur lokoj por babilo inter esperantistoj sed unue por « vendi » esperanton al vizitantoj, do necesas alparoli preterpasantojn, ktp .

Çar mankas spaco por ekspozicii, ni evitu kompletajn kolektojn da revuoj, librojn de francaj aùtoroj, esperanta-jojn, ktp . Eventuale stoki materialon en valizoj por apogi argumentojn . Novaj informiloj estis preparitaj (formato A5), JH montras informilon sub la formo de demandoj-respondoj kaj atendas rimarkojn . Pri la materialo uzenda/uzinda, çiu devas scii, kie ĝi estas disponebla . Ekde nun Serge Eysseric stokos banderolojn kaj panelojn (*vidu detalojn sur paĝo 4*) . Francis Bernard insistas, por ke estu kunrespondeculo en çiu grupo (li-mem en Lozère, Charles Gérard en P-O, Geneviève en Béziers) . Monique Eysseric mencias la mankon de materialo por la forumo de Lunel . JH bedaùras la incidenton kaj memorigas, ke necesas sin anonci iom anticipe por eventuala partigo de la materialo en kazo de samtempaj eventoj . Pro la necerta vetero en septembro, tendotegmento (« barnum »), kiel en Montpellier, ŝirmas kontraù pluvo kaj suno . La novaj paneloj pro ilia formato ne estas çiam facile uzeblaj ekstere . Çu antaùvidi pli altan tablon por starigi kelkajn panelojn fronte (antaù la tablo) ?

Baldaùaj renkontoj

Turisma semajno en Katalunio (partoprenos plura federaciaĵoj) (*vidu raporton sur p. 7*), ĥorstaĝo en Ariège . Estas menciata vojaĝo al Ĉinio printempe (organizata de la francaj fervojistoj) . Kaj kompreneble Zamenhof-tagoj en Montpellier (la 3an de decembro) kaj Béziers (la 10an de decembro) .

Vivo de la grupoj, kursoj

Legu SFS kaj la grupoj raportu ! En Montpellier okazos kursoj en du MPT (maisons pour tous / Ĉiesdomoj) . Por la venontaj kunvenoj estos programo . Çu antaùvideblas aliaj formoj ol çiusemajnaj kursoj ? Homoj ne povas çiam sin liberigi je preciza horaro . Ekzemple : homoj eklernu sendepende (libro, perkoresponda aù reta kurso) kaj kompletigu pertelefone .

SFS : abonoj

SFS dependas de siaj legantoj (kontribuoj, respekto de la limdato, raportoj) . Pri abonoj ; ne çiam eblas diveni de kiu venas la pago. Do, la grupoj sendu la liston de la abonantoj kaj la individuoj sendu sian čekon en koverto al la kasistino . Relegi la lastan SFS . La tarifo de la abono por 2006 restas sensanĝa .

Biblioteko

Kiel jam dirite, la federacio povus kompletigi la libron de la grupo de Montpellier, por ke ĝi estu ankaù

federacia biblioteko . Monique Eysseric precizigas, ke ne estas ĉiam facile difini al kiu kategorio apartenas iu libro . Eblas kompari kun jam ekzistantaj listoj kaj katalogoj . JH rilatos kun GG por scii, kiel statas la afero (aldona meblo, libroj el Nîmes, ktp) .

Eventoj 2006

Federacia kongreso : ĉu en urbeto kiel Ganges, Gignac, Clermont l'Hérault ? Jean-Pierre Peray proponas, ke ĝi okazu dum la staĝo de Batipaume, dimanĉe kiam ne estas kursoj . Propono unuanime akceptita . Ni atendos respondon de **Batipaume pri la 11a de junio, la dimanĉo post Pentekosto** . Necesos por la partoprenontoj sin anonci anticipe por rezervi la manĝo(j)n, ktp . Klarigoj troveblas en SFS .

Nacia kongreso : ĉu Gray ? Estas bedaŭrinde, ke la loko de la venonta kongreso ne estas ankoraŭ konata .

Kafe : Kultura kaj arta festivalo de esperanto . Ĝi okazos julie en Tuluzo, antaŭ la UK en Florenco . *Fakte nun rezignis la Tuluzanoj pri la organizado de tiu KAFE ! Male, la nacia kongreso eble okazos en Tuluzo...*

UK de Florenco : multaj deziras ĝin partopreni (pro la proksimeco) . Iuj demandas, ĉu oni organizos busvojaĝon . Ĉar loĝado estas sufiĉe multekosta en Italio, ne estus same kiel por Vilno, do rektaj irado kaj reveno . Trajne estas iom komplike (3 ŝanĝoj) . Buse estas rektaj linioj el Montpellier (Eurolines) . *Prezo inter 100 kaj 120[€], noktomeze el Montpellier kaj je la 9a horo matene en Florenco . Rabato por grupoj ekde 10 personoj...* Dubinde, ĉu luj buson estus interese, ĉar la buso devus reveni de Florenco malplena kaj same reveturi al F, por ne atendi tutan semajnon ...

La grupo de Bourg en Bresse organizas busveturadon al la UK . Prezo kun loĝado en Florenco (vidu p . 3 !) . Ĉu atendi la proponojn de UEA pri loĝado ? Certe estos ankaŭ ne tro kostaj solvoj (studentaj hejmoj, ktp) .

Ideoj, proponoj

Ni disponas pri diversaj paneloj, kiuj povus konsistigi ekspozicion montreblan diversloke (ekzemple CDI de kolegioj, liceoj) kaj sen konstanta ĉeesto de esperantisto .

Retpaĝaro : la afero paneas, Christian Pinard ne prizorgis . Ni devos rekonsideri la aferon .

Line Maurel opinias, ke etiketoj en esperanto sur la boteloj de la vitbieno Carbonnel estis bona propagandilo .

La federacio surprenas la kostojn de presado de « kontraŭetiketoj », se la famiĵlio Carbonnel konsentos .

Francis Bernard konsultos la eldoniston de « E^o-Info » pri prezoj kaj proponos modelon .

Annick Tora informas, ke Guy Béart, konata kantisto/gitaristo, kiu vizitis la UK de Montpellier, donos koncerton . Post dankoj pro la atentemo, ni adiaŭis je la 17a horo kaj rendezuis en decembro por la Z-tagoj .

Por kompletigi kelkajn informojn ĉi-suprajn :

Vojaĝo al Ĉinio : organizata de la francaj fervojistoj kun la vojaĝagentejo Kuoni .

De la 27a de aprilo ĝis la 13a de majo . Kosto : 1494[€] (sen la semajno en la fervojista kongreso de Shanghai) .

Vizitoj de Pekino, de la Granda Murego, de la grotoj de Longmen, de la monaĥejo Shaolin, ktp . Detaloj ĉe SFS .

Busvojaĝo al la UK de Florenco (organizata de la E^o-grupo de Bourg en Bresse) . Foriro vendredon la 28an de julio vespere (enbusa nokto), alveno en Florenco sabaton la 29an matene . Loĝado en tristela hotelo (dustela laŭ la franca klasifiko) kun matenmanĝoj . Reveno la 5an de aŭgusto . Prezo : 415[€] (surbaze de 50 kunveturontoj !) . Por informoj kontakti 04 74 37 72 46 (E^o-Bourg en Bresse) aŭ Michel Fontaine 7, Rue du Docteur Roux 01000 Bourg en Bresse 04 74 21 61 43

La 15a de Decembro...

...ne estu nur Zamenhof-tago kaj tago de la Esperanto-Libro . La estraro de UEA decidis, ke ĉijare eksperimente la semajno de la 10a ĝis la 18a de decembro estos la semajno de homaj rajtoj kaj esperanto . « La ekzisto de alekster elementoj (la homaj rajtoj) igas ebla kaj dezirinda la kunorganizado de eventoj kun neesperantistaj asocioj » .

Temo de UK 2006 : daŭrigebla evoluo »

Tiu temo (la vortoj « daŭrigebla evoluo » estas kontestataj de iuj harfendemuloj sur retlistoj) estis elektita de la estraro de UEA por atentigi pri esperanto Uneskon kaj ĝiajn klubojn, kiuj jam faris kampanjojn pri la sama temo . La termino « daŭrigebla evoluo » aperis en 1987, en raporto de la prezidanto de la Monda Komisiono pri Medio kaj Evoluo kun la titolo « nia komuna estonteco » . La raporto menciis ok ĉefajn temojn, gravajn por sekurigi daŭrigeblan evoluon en la mondo sed ne menciis lingvajn problemojn . .

Lastminute : nacia kongreso

Ĝi ne okazos en Tuluzo, kiel indikite ĉi-supre, sed eble...en **Rennes** .



VIVO DE LA GRUPOJ

BEZIERS

Monataj kunvenoj : la 19an de novembro, (en decembro Zamenhof-tago, vidu poste), la 14an de januaro 2006, la 11an de februaro, la 11an de marto, la 8an de aprilo, la 13an de majo, la 14an de junio ĉiam je 14h30 en nia klubejo – MVA 3a etaĝo .

Ni esperas, ke vi venos multaj, kaj alportos interesajn ideojn por gajigi niajn kunvenojn .

Z-tago : Ĝi okazos **sabaton, la 10an de decembro** ekde la 10a matene ĝis la 17a horo .
 Principe : bildraporto matene pri la UK en Vilno . Post la manĝo, distra parto (skeĉoj, muziko) .
 Komuna manĝo en restoracio « Les Comédiens » . Ĉiuj estas kore invititaj sed **anoncu vin antaŭ la 1a de decembro** por rezervi lokojn en la restoracio . Venu kun geamikoj, eĉ neesperantistaj .

MONTPELLIER

Monataj kunvenoj : ĉiam **sabate**, de la 10a horo ĝis la 14a, kunvenejo : **MPT L'Escoutaïre** .

Datoj : la 22an de oktobro, la 5an de novembro, la 3an de decembro (Z-Tago), la 14an de januaro, la 11an de februaro, la 11an de marto, la 22an de aprilo, la 20an de majo, la 3an de junio .

Kursoj : En du MPT . En L'Escoutaïre ili komenciĝos, tuj kiam Jeanne bone fartos, **ĵaŭde** de 9h30 ĝis la 11a h, tiuj kursoj estas por la **dua nivelo** . En MPT **Georges Brassens**, Josée gvidas du kursojn :
 -por **komencantoj** : lunde de 14h30 ĝis la 16a h . -**dua nivelo** : **merkrede** 18h-19h30 .

Juna Germanino, kiu staĝumas en MPT G.Brassens, rimarkis, ke estas kursoj pri esperanto. Ŝi venis je la unua kurso por peti informojn kaj tuj ŝi estis allogita kaj partoprenas la du kursojn! Ŝi ricevis adresojn de esperantistoj en norda Germanio kaj kiam ŝi reiros hejmen, post tri monatoj, ŝi povos daŭrigi la lernadon de esperanto .

Subvencio : la subvencipeto estas sendita al la urbdomo .

Ni prezentas nian sinceran kondolencon al Yvette Vierne kaj Lucette Négron pro la forpaso de ilia frato .

FORUMOJ DE ASOCIOJ

Post Campagnan okazis forumoj en Béziers, Montpellier, Lunel, La Canourgue, Paulhan .

Pluvo alternis kun suno en Montpellier kaj perturbis la forumon . Ni vidos, ĉu la informpetintoj konfirmos la intencon eklerni esperanton . Notinde, ke en Montpellier pluraj junuloj, eklerninte per retkurso, indikis sian intencon partopreni la grupkunvenojn por praktiki la lingvon . En Lunel estas nun kurso kun 4 gelernantoj, inter ili du estas liceaninoj . En La Canourgue sin prezentis...juna esperantisto, kiu loĝas apude de kelkaj semajnoj (instruisto) .En Perpignan ekfunkcias kurso kun tri junulinoj .

MATERIALO

La federacio disponas pri materialo (paneloj –nova serio da 12 paneloj- banderoloj, elektronika panelo –tre alloga ekstere- , projekciilo, televidilo/magnetoskopo...), kiun ĉiu federaciano povas/rajtas pruntepreni por forumo de asocioj, ekspozicio, staĝo, ktp . Kompreneble, ĉiu prunteprenonto devos prizorgi la transporton, respekti la materialon, eventuale ripari aŭ riparigi ĝin kaj fine reporti ĝin al la loko, kie li/ŝi ĝin prunteprenis .

La lasta kondiĉo ne estas ĉiam respektita, pro tio mankas pluraj banderoloj kaj paneloj . Supozeble ili ne estas perditaj, sed kie ili estas nun ? Estis decidite en la lasta kunveno de Béziers, ke Serge Eysseric en Montferrier (norda ĉirkaŭurbo de Montpellier), tel. 04 67 59 80 13, respondecos pri la afero kaj trovos lokon por stoki la materialon. Ekzemple ne plu troveblas la panelo « kamemberto »(aŭ « kuko ») . Temas pri panelo, jam dufoje farita, kun la dispartigo de la ĉefaj lingvoj kaj ĝi bone taŭgas por ekdis-kuti kun vizitanto de forumo aŭ de ekspozicio . Bonvolu baldaŭ sciiĝi, se vi hazarde konservis ĝin ! Anticipan dankon !

Kaj kompreneble, estas rekomendinde por pruntepreno de la materialo, **sin anonci iom anticipe** .

Je iuj datoj, ekzemple en septembro, la materialo estas bezonata en pluraj lokoj samdate; tio okazis antaŭ nelonge, bedaŭrinde . En tiu kazo certe eblas dividi la materialon, se oni akordiĝas antaŭe .

Dankon pro via komprenemo por pli glata funkciado de la afero .

Parenteze dirite, la nova serio da paneloj estas oportuna por ekspozicio ; oni povas lasi ilin en sekura loko dum pluraj tagoj . Konigi esperanton estas la devo de ĉiu esperantisto .

APUDE

Katalunio

Barcelona renkontiĝo (16a-18a de septembro) . Anoncis sin 51 personoj sed partoprenis pli ol 80 ! Laŭ raporteto ricevita : « la programo bonis, la festumado bonegis, ankaŭ la ekskursoj » . Menciindas « indymedia »-ateliero kaj la partopreno de kelkaj eksterlandanoj . Pri la semajno en Calella vidu apartan raporton .

Carcassonne

8000 personoj (inter 5000 kaj 10 000 laŭ la fontoj) manifestaciis en oktobro por la defendo de la okcitana lingvo . Partoprenis defendantoj de aliaj regionaj lingvoj, ankaŭ kelkaj esperantistoj (inter ili delegacio de Katalunio) .

Alia manifestacio estas antaŭvidita en Villers-Cotterets (02), urbo fama pro la edikto de la reĝo Francisko la 1a, kiu oficialigis la francan lingvon . Tiu manifestacio celos la defendon de la franca lingvo . Ekzemple, en tiu departemento, la departementa konsilio sendis al ĉiu hejmo KD-rom por lerni la anglan lingvon kaj nun lanĉas kampanjon en la angla (400 afiŝoj en la pariza metroo kun sloganoj kiel : Rock Aisne Roll, Peace Aisne Love, ktp) . Kontaktadreso de la prezidanto de la konsilio, Sro Daudigny : contact@cg02.fr

Millau

En tiu urbo, rando de nia federacio kaj kie ni jam kunvenis, junuloj provas relanĉi esperanton . Interesa artikolo aperis en « Le Journal de Millau » de la 8a de septembro (vidu dekstre) . Bonan sukceson al tiu iniciato, kiun ni volonte helpos, se dezirate .

Montpellier

Post la eldono de la informilo « l'essentiel de l'espéranto », « Réinsertion et espéranto » anoncas la baldaŭan aperon de « Imagier espéranto-français » kaj « petit guide de conversation » . Ĝi daŭre proponas glubendojn por veturiloj en 24 lingvoj . La asocio kunvenos la 19an de novembro je la 14a horo, 26 Rue Enclos-Fermaud (je 300 m de la stacidomo) . Kontakteblecoj : 04 67 91 01 96 kaj 06 66 46 77 07, fakse 04 67 92 75 44 apsike1997@yahoo.fr <http://apsike1997.free.fr>

Résidence « L'Espéranto »

Jam ekzistas strato Zamenhof en Montpellier . Ankaŭ menciindas la rezidejo « L'Espéranto », en ZAC Malbosc, kie oni proponas « sociajn loĝejojn » . Informo sendita de JB (Gazeto de la urbeĝo / journal de l'agĝlo) . Ĉu plia ZEO ?



ALILOKE

Ekspedicio CapAsia

Oni ne plu kalkulas la nombron da personoj, kiuj vojaĝas tra la mondo per esperanto . Kun la helpo de la Esperanto-centro de Angers, 2 studentoj, kiuj rapide lernis esperanton por uzi la Pasportan Servon estas nun survoje al Azio . Vi povas subteni ilin kaj legi iliajn franclingvajn informojn ĉe <http://capasia.over-blog.com>

Infandeseĝnaĵoj

« Espéranto en Vendômois »
adreso : Les Monts 41330 Lunay
esperantoenvendomois@club-internet.fr proponas partoprenigi infanojn en konkurso de desegnaĵoj . 3 kategorioj : A (ĝis 7jara), B (ĝis 10jara), C (ĝis 14jara); formato : minimume 40x30 cm ; limdato 25a de majo 2006 ; jara temo : el tiuj kvar elementoj, kiu(j) inspiras vin : akvo, fajro, tero, aero ; indikoj dorse de la desegnaĵo, esperantlingve nomo, aĝo, adreso de la lernejo aŭ E*-klubo, koncizan priskribon de la « verko » . Ĉiu infano ricevos partoprenan diplomon . Libroj, kasedoj, KD, T-ĉemizoj konsistigos la premiojn (po 3 en ĉiu kategorio) .

Apprendre l'espéranto

L'association Millau Espéranto se lance

L'espéranto est une langue internationale simple, régulière, inventée en 1887 par un jeune médecin polonais, Louis-Lazare Zamenhof, qui avait conscience des difficultés de communication entre personnes n'ayant pas la même langue maternelle. Son but est de faciliter la communication entre les peuples du monde entier, et plus d'un siècle d'utilisation pratique en a fait une langue vivante capable d'exprimer toutes les nuances de la pensée. L'espéranto est une langue neutre et internationale parce qu'elle appartient à tous les peuples et permet à chaque être humain, quels que soient son origine, son milieu, sa génération, de communiquer avec d'autres personnes de langue différente, sans référence à une quelconque hégémonie culturelle, politique, religieuse ou économique. Apprendre l'espéranto, c'est voir le monde d'une autre façon. Ainsi, les espérantophones, par leur connaissance de la langue internationale, peuvent établir des contacts directs avec d'autres hommes et femmes d'autres pays, sans se limiter à un pays ou groupe de pays en particulier. De véritables échanges se créent, chacun s'enrichit mutuellement au contact de l'autre, en découvrant d'autres cultures et en faisant découvrir la sienne. Aujourd'hui, des centaines d'associations locales, nationales et internationales permettent de pratiquer la langue encore plus facilement, de la faire connaître et de l'enseigner. Réparties sur les cinq continents, elles forment un véritable réseau d'amitié sur la base d'une compréhension sans difficulté (réseau d'hébergement gratuit chez l'habitant). L'association Millau Espéranto rejoint ces objectifs et souhaite vous faire découvrir cette langue internationale. La première de ses activités sera de mettre en place très prochainement des cours pour débutants. Les personnes intéressées par l'espéranto sont invitées à prendre contact avec l'association par l'adresse électronique millau-esperanto@wanadoo.fr pour que nous puissions organiser cette activité dans les meilleures conditions. On peut aussi consulter le site millau-esperanto.ifrance.com
A bientôt... Ĝis baldaŭ...●

SOMERE

Ne mankis eblecoj en Esperantio dumsomere, de Sète en nia regiono ĝis la UK de Vilno. Jen tri raportoj, la unua pri muzikstaĝo en Bouresse, la dua pri Plouézec en Bretonio (artikolo el « Le Télégramme ») kaj fine la tria pri la semajno de Sète.

Muzikstaĝo :

La staĝo « Kantoj kaj muziko » en Kvinpetalo (Bouresse) okazis de la 2a ĝis la 12a de aŭgusto .

Triafoje, Geneviève kaj Line partoprenis en tiu staĝo, ĉiam gvidata de An-Sofi Markov kaj Lino . Ties amikino Stefani aldoniĝis al la teamo .

La staĝo daŭris dek tagojn ; en la mezo, ripozo dum dimanĉo . Estis multaj muzikistoj, ĉefe bekflutistoj . Ĉiuj estis ni aŭskultis paroladojn pri muzikoj, muzikisto (Wagner) kaj klarigoj pri la uzado de instrumentoj kiel trumpeto, klarneto, flutoj, gambvjolo, ktp .

Poste ni lernis diversajn agrablajn kantojn antaŭ ol fari grupetojn de muzikistoj kaj kantistoj por interpreti pecojn de klasika aŭ moderna muziko .

Por plibonigi la voĉon, ĉiuvespere ni prilaboris en ĥoro « Edziĝkanto »-n de la lando Estonio . Tiu kvarvoĉa kanto estis sufiĉe malfacila sed ni sukcesis bone kanti ĝin .

Kiel ĉiujfoje, la staĝo finiĝis per malgranda koncerto, registrita de Serge Sire .

Ĉar estis multaj gejunuloj, la etoso estis tre agrabla kaj ni multe ridis . La bela vetero plibeligis la restadon. Ĉiuj, kiuj havis aŭ ne konojn pri kantoj aŭ muziko, plezure progresis laŭ siaj niveloj kaj deziroj.

Venontan jaron, ni esperas denove partopreni en Bouresse por la kvara fojo kaj ni kuraĝigas ĉiujn samideanojn nin akompani al Kvinpetalo .

Geneviève kaj Line

NDLR : Kiu akompanos niajn ĉarmajn muzikistinojn ?

Marborde (Bretonio)

La staĝo de Plouézec estas nun internacie fama . Pardonu, se la teksto, sendita rete, aperas kun malgrandaj blankaj kvadratoj anstataŭ literoj kun akcentoj .



Des espérantistes du monde entier se retrouvent.

Les 9 e s rencontres internationales d'espéranto qui se dérouleront tout au long de la semaine, ont débuté samedi à Plouézec (22). Pas moins de 181 participants dont 19 venus de Chine, d'Inde, d'Allemagne, de Hongrie, des Pays-Bas, de Russie, de Serbie, d'Australie, de Belgique et de Suède, ainsi que 28 jeunes de moins de 20 ans, se sont retrouvés à la salle des fêtes pour l'ouverture de ces rencontres. Au programme, des cours d'espéranto, de pédagogie pour les professeurs, d'informatique et de théâtre et des sorties touristiques. En soirée, place à la culture avec de la danse, des chants et des conférences sur l'Australie, le Tsunami ainsi que le récit du voyage de Zef qui a effectué Brest-Vladivostok à vélo. (Photo Caroline Cotard)

17/08

Marborde (Langvedoko)

Dimanĉon, la 20an de aŭgusto, je la 9a matene, la staĝo en Lazaret komenciĝas, sub ne tre favoraj aŭspicioj : ventego kaj nuboj iom malvarmigas la temperaturon . Ĉijare la staĝo arigas malmultajn esperantistojn, sed ĉiu el ili estas vere escepta .

Inter ni preskaŭ sin kaŝas Lilli, denaske esperantistino, kiu estas posedata de arta talento . Ŝi belege akvarelumas kaj bonege rilatas la okazintaĵojn de la staĝo. Jen ekzemplo ĉi-poste de ŝia arto .

La edzo de Lilli, Lulu, povas daŭre paroli, dum nekalkulebla tempo . Daniel Moirand kaj Josiane dispecigetis sian esperantan konon, sian elegantan paroladon kaj sian afablan amikecon .

Gerard, vera sudlandano, kun kantanta akĉento, ŝatas petoli, sed ne kredu, ke li nur scias tion, tute ne, li bone parolas nian karan lingvon, malgraŭ pluraj jaroj da kabeo . Nun li deziras denove sin mergi en la praktiko de la lingvo . Mikael venis kun sia fratino, Beate, el Germanio . Li bonege parolas, sed ŝi komencis lerni kun Jorgos, samtempe kun geedzoj Paŝa kaj Nil . Post 3 tagoj da lernado, mi miras : ili bonege legas kaj komprenas la « Junulkurso »-n . Denise, ĉiam atentema pri la eventoj, kiuj lasus al ŝi la eblecon traŝovi sian historieton .

En sia rulseĝo, senbrue, Yvette iras kaj reen kaj ŝi vidas ĉion, eĉ se ŝi nenion diras .

Jen eta bildo de nia staĝo en Sète dum la jaro 2005, kie la etoso estis agrabla kiel kutime .

Josée

NDLR : Eĉ se vi ne estas escepta persono, vi estos akceptata en la venonta staĝo kaj fariĝos escepta dum la semajno.


Akvarelo de Lilli : unu el la loĝdomoj, konstruitaj antaŭ 100 jaroj .



Internacia semajno en Calella (1-8 X)

Laŭ la raportoj de 4 partoprenintoj .

Almenaŭ 8 geesperantistoj el nia federacio partoprenis la 13an internacian semajnon de kulturo kaj turismo en Calella (Katalunio) . 105 partoprenantoj reprezentis **dekon da landoj** : Belgio, Francio, Germanio, Hispanio, Slovakio, Japanio, Meksikio, Svedio, ktp . Plej multaj estis la Francoj (51 laŭ unu raporto, 62 aŭ 63 laŭ alia raporto...) . Kiel kutime, la hotelo estis sufiĉe komforta, la bufedo abunda kaj bongusta . Estis tre agrabla semajno kun iom freŝaj temperaturoj kaj aŭtuna suno . Funkciis du esperanto-kursoj, supera kun Salvador Aragaj kaj alia por komencantoj kun Josée Lafosse .



Ekskursoj –unu tuttaga, du duontagaj- ebligis viziti Palamos, Arbucies, ruinojn de iberia vilago .

Pri la programo, ni aparte ŝatis la eklektismon de la temoj . La **prelegoj** temis pri

-Don Quijote (du prelegoj, pro la kvarcenta datreveno, de Antonio-Marko Botella, « Idealismo kaj realo en la verko « Don Quijote de la Mancha », kaj de Luis Serrano, « Alitipa legado de Don Q » ,

-La cent jaroj de la revuo « Esperanto » kun Stano Marček, cefredaktoro,

-Skizo pri la evoluo de la vegetaĵoj kun Profesoro Pere Navarro Rosinès .

Pli vivanta kaj distra okazis **debato**, kies temo estis : « nia socio estas violenta, kial ? » . La diversaj vidpunktoj ŝprucis vigle en la salono ; diroj, kontraŭdiroj, konsentoj, malkonsentoj animis tiun vesperon . La **premio** Ada Sikorska-Fighiera estis aljuĝita ĉijare al Raymond Boré pro liaj multaj agadoj por esperanto . (*Ĉar Raymond Boré estas fidela leganto de SFS, ni varme gratulas lin pro la meritata honoraĵo*) .

Okazis **granda premiero** dum la semajno, naskiĝis granda trupo . La trupo « Ĝo-Jo » (ĉu prononci kiel « ĝojo » ?) aldonis novajn aktorojn en sia sino . Dum unu horo kaj duono ili prezentis skeĉojn pli malpli viglajn . Komence, en tiu nune granda trupo aktoris nur du personoj : Josée Boccadifuoco kaj Georges Gonthier . Nun kun novbakitaj elementoj, ili pligrandigis la trupon ...dank'al Serge kaj Monique Eysseric . Monique nuance, elegante, senpene, facile eniris la haŭton de la rolulo, kiun ŝi interpretis, ĉu kiel klientino ĉe la veterinaro, ĉu kiel eleganta ĵurnalistino . Ŝia vizaĝo donis la nuanc-esprimojn de la diritaj sentoj, ĉiam kun gracieco . Christian de Wilde, aŭvernian harmonikisto, plenigis la interaktojn per konataj, popolaj muzikoj kaj ni ne forgesu Andrée Clément el departemento Var . Luis Serrano el Sabadell prezentis la diversajn skeĉojn . Estis tre agrabla vespero, bonan daŭrigon al la trupo ! *Gratulojn al la « granda trupo » !*

La urbestro de Calella inaŭguris **memortabulon** pri la semajno en la publika parko Dalmaŭ kaj poste akceptis la tutan esperantistaron en la **urbdomo** . Sekvis vizito de la interesa loka **muzeo** .

Calella estas aŭtentika loko, ne nur « ĉampinjona » banloko. Oni volonte promenas sur la stratetoj, oni paŝas sur la placo de la preĝejo, kies olivarbo estas granda kaj belega, oni sin instalas kun geamikoj en la trinkejoj por gustumi « **sangria** » (pri la temo ni havas kelkajn verajn rakontotajn anekdotojn...) . Ankaŭ dum la du interkonatiĝaj vesperoj oni multe trinkis la ŝaŭmvinon « Esperanto », iom pompe nomitan « ĉampano » . Pli bongustis la fama « **cremat** », varma specialaĵo kun rumo, trinkaĵo de la mediteraneaj fiŝkaptistoj .

Ĉijare la unuiĝo inter ĉiuj estis pli videbla ol en la antaŭaj jaroj . Estis rava momento, kiam ni kunkantis la Eŭropan himnon . La frateco, kiu regis dum la tuta semajno, estas en niaj memoroj kaj sufiĉos por atendi ĝis la venonta jaro senpacience .

Blazono de Calella



Le congrès de Vilnius dans la presse régionale :

En complément des deux articles déjà parus dans le dernier SFS, un long article est paru dans le « Midi Libre » du 3 septembre . Malgré quelques coupures –le texte était un peu long – l'article est très informatif . Félicitations à l'auteur ! Sur la photo, vous reconnaîtrez peut-être quelques membres de la fédération . Au milieu du panneau indiquant le centre de l'Europe, un Africain et une Chinoise ! Sur la page suivante, extraite de « Esperanto Info » de septembre-octobre (avec l'aimable autorisation du rédacteur Francis Bernard), est relaté un incident survenu pendant l'avant-dernière étape en Autriche...quand un des participants, Noël, est resté sur l'aire d'autoroute... Noël malaperis sed reaperis !

GRAND MONTPELLIER

Montferrier-sur-Lez

Quarante espérantistes régionaux au congrès mondial à Vilnius

Le 90e congrès mondial d'espéranto s'est déroulé cette année à Vilnius, capitale de la Lituanie. Quarante espérantistes de la région Languedoc-Roussillon avaient fait le voyage organisé par Jean Henin, président de la fédération régionale, pour retrouver les 2 400 congressistes venus de 62 pays différents. Serge Eyseric, responsable communication du centre culturel espéranto de Montpellier, et plusieurs Montferriérains en faisaient partie.

Cent ans se sont écoulés depuis le premier congrès international d'espéranto, organisé en 1905 à Boulogne-sur-Mer, en présence du docteur Zamenhof, un médecin idéaliste qui, s'appuyant sur des idées d'une langue commune chère à Descartes, créa l'espéranto.

L'espéranto, langue internationale, permet précisément une communication directe et facile, dans le respect des cultures et des visions du monde les plus diverses. En 2004, c'est à Pékin, en Chine, que les espérantistes avaient choisi de se retrouver ; en 2006, ce sera à Florence en Italie ; en 2007 à Yokohama au Japon. En 1998, Montpellier avait eu le privilège d'être le centre du monde espérantiste l'espace d'un congrès.

Les espérantistes languedociens ont activement partici-



Un club d'espéranto à Montferrier, pourquoi pas ?

pé aux diverses manifestations qui, outre le programme spécifiquement consacré au thème officiel du congrès, leur étaient proposées : découvertes du pays d'accueil, Vilnius est une vieille et belle capitale d'un pays millénaire, centre éphémère du monde de l'espéranto, mais également très proche du centre géographique de l'Europe, déterminé par les experts de notre IGN national, les Lituanais en sont d'ailleurs très fiers. Les visites furent sui-

vies d'excursions touristiques avec la possibilité de s'initier à la langue locale.

Les congressistes avaient aussi la possibilité de perfectionner leur espéranto par des cours animés par des enseignants de grand talent et de passer divers examens sanctionnant les cycles d'études.

Enfin, à côté des représentations théâtrales, concerts, rencontre avec les auteurs espérantophones, une séance publique de l'académie d'espé-

ranto a été très appréciée.


L'espéranto a suscité, au cours des dernières années, un intérêt croissant, pour plusieurs raisons : neutralité vis-à-vis des langues nationales, facilité d'apprentissage, possibilités d'utilisations dans le monde.

En effet, des millions de personnes dans 120 pays parlent et échangent des idées en espéranto, la progression ne cesse de croître principalement dans le monde asiatique. ●


Per buso, ni foriras de Montpellier al Vilnius.



En la buso, jen Noël.



Kaj jen Gaston, sed ne konfuzu kun Gastono la Fuŝulo !



Oni dormas...




...manĝas, trinkas, kantas...



Unu el niaj kantistoj

Ni trairas kelkajn belegajn urbojn sen forgesi foti memorajn lokojn.



En buso, kiam oni ne dormas, oni babilegas !




Oni eniras hotelojn...



... kaj eliras...



...finfine alvenas al la kongresejo kie akceptas nin inter aliaj la urbestro kaj iu ministro. Tra la urbo videblas multaj afiŝoj kaj flagoj pri esperanto.



Post la kongreso, revenante hejmen, oni bezonas pis-haltojn.

Post unu horo :

Atentu, nur 20 minutojn vi havas !



Kie estas Noël ?



Ĉu ni retrovos Noël per anoncoj ?



Per poŝtelefono kaj petveturado, li finfine retrovis la buson, laca sed ĝoja songante pri venontaj vojaĝoj.





Ekspedicio al la UK de Vilno

Malfacilas rakonti en kelkaj paragrafoj tiun dusemajnan vojaĝon, kiun partoprenis kvardek geesperantistoj, konfirmitaj aŭ ne; ne sufiĉus la kompleta SFS . Ne estis facila la preparlaboro kaj estis kelkaj seniluziigoj, ŝprucis kelkaj problemetoj survoje, speciale rompoŝtelo en Pollando, kiu lasis nin sen la sonaparataro, sed pli gravas, ke ni kunvivis vojaĝon en amika etoso, ke ni malkovris multe kaj ke tiuj, kiuj partoprenis UK por la unua fojo, estis konvinkitaj de la dimensio de "universala" kongreso, kie renkontiĝis sen lingvoproblemoj homoj el 62 nacioj kaj el ĉiuj kontinentoj en frateca etoso, kaj ankaŭ de la multfacetaj uzoj de la internacia lingvo .

Ĉar bildoj valoras pli ol longaj paroladoj, laŭ franca proverbo, jen kelkaj memoraĵoj el tiu ekspedicio 2005 . Tiuj bildoj estas tiritaj el mia "albumo", aŭ pli precize el mia lumbildaro, kiu estos prezentata pli detale dum la Z-tago en Béziers, la 10an de decembro . Se eblas al vi veni, vi estas kore invitata por iom travivi la aventur(et)on (preskaŭ 6000 km entute) .

Laŭ mia takso, estis bonega kongreso, ekzemple organizita . Estis eldonita poŝtmarko, la ministro pri eksteraj rilatoj de Litovio partoprenis la malferman ceremonion, ĉiu kongresano trovis en sia dokumentaro du belajn librojn, unu pri la kongresurbo Vilno (Vilnius) kaj la alia pri Vilnius kaj Trakai .



La muzika programo estis bonkvalita (male al la teatra, laŭ mia takso), la partopreno en la diversaj aranĝoj estis ankaŭ bona (aŭ ĉu la salonoj estis tro malgrandaj ?) Persone mi ne povis partopreni kelkajn prelegojn aŭ kunvenojn pro homplenaj salonoj sed tio donis al mi la okazon iom viziti la interesan malnovan urbon .

La bildoj montras spektaklon de la nacia vespero, kun belaj kostumoj de la pasinteco kaj spontanegan gajan etoson en la kongresejo, kiam kantisto el Kubo kun gitaro kunkantigas la apudulojn (ĉu li kantis «Guantanamo» ? Ĉu baldaŭ aperos kompaktdisko de liaj kantoj ?) .




Pri la urbo, mi elektis bildon pri ortodoksa preĝejo kun verdaj kupoloj (bedaŭrinde vi ne vidis la kolorojn de la bildoj) ; en Vilno staras multnombraj preĝejoj, same kiel en Pollando . En tiu preĝejo, mi vidis tekstojn en cirilaj karakteroj, kio iĝas tie maloftaĵo pro la falo de la rusa influo, eĉ se multaj homoj kapablas paroli la rusan lingvon .

Permesu min prezenti al vi nian plej ekzotikan gaston, « Irena » el ... Ĉinio (Pekino) . Ŝi flugis rekte de Pekino al Parizo kaj poste kuniĝis nian grupon kaj sentis sin tre bone inter ni kaj kompreneble ni ŝin amike akceptis .

Si ĵus finis siajn universitatajn studojn (pri komunikado), gvidis ekskursojn en la UK de Pekino lastjare, kaj nun staĝumas en Nederlando . Ni certe havos la okazon revidi ŝin . Ĉu necesas diri, ke ŝia venigo ne estis simpla kaj ke ne mankis vizo-problemoj... ? Sur la bildoj, vi vidas ŝin antaŭ restoracio en Rothenburg ob der Tauber, bela mezepoka urbo kun remparoj, sur la germana romantika vojo . La menuo, kiu pendas, estas en du lingvoj, la ĉina kaj la japana, ĉar tie oni akceptas kaj atendas turistojn el Azio ! Sur la alia bildo, ŝi konversacias kun samlandanino, kiu kantis dum la UK kaj kies voĉo mirigis nin .




Alia prezentinda (prezentenda) partopreninto estas Lucile, la nepino de Ges. Bernard . Niaj homoj estis (preskaŭ) inter 7 kaj 77 jaraĝaj (sufiĉas aldoni 6 jarojn), do estis diversaj generacioj . Lucile havis multajn oportunojn enbuse aŭ enkongrese praktiki la internacian lingvon, post nur unujara kurso en sia kolegio kaj ankaŭ familia partopreno en diversaj aranĝoj . Sur la foto ŝi estis fotita en Rothenburg, kiu estas unu el la ateleroj, kie la ulo, ruĝevestita la 25an de decembro, preparas siajn ludilojn... Tutjare oni povas viziti la vendejojn kaj iom revii . Mi prezentu ankaŭ la tutan grupon en du lokoj sur la monteto Wawel en Krakovo, historia ĉefurbo de Pollando, certe unu el la urboj, kiun ni plej ŝatis . Akompanas kaj lerte gvidas nin lokaj geesperantistoj . Sur unu bildo, konstruaĵo restaŭrita en la renesanca stilo kaj sur la alia, apud la historie simbola katedralo, la kupolo de la kapelo al Sankta Sigismund estas kovrita ...de oro (ni ne kontrolis !).



Survoje ni traveturis plurajn landojn . Bedaŭrinde ankoraŭ ne ĉiuj uzas «eŭro»-n ! Eŭropo estas spaco de kontrastoj, inter verda Svislando (pro la malseka klimato) kaj la fajrobruligitaj montetoj de suda Francio, inter modernaj urboj en Germanio aŭ Aŭstrio kaj la trankvila kampara vivo de Slovakio, inter la tarifoj okcidente kaj oriente, inter la ĉieaj aŭtoŝoseoj en Germanio kaj la mallarĝaj vojoj en Pollando, ktp . Restas grandaj diferencoj inter la membroj de la Eŭropa Unio . Ni ne renkontis la famigitan « polan plumbiston » (en iuj hoteloj, li estus tre dezirinda) sed ni konstatis la hegemonion de iuj okcidentaj firmaoj, speciale francaj, en Ĉeĥio kaj Pollando, kiun ni neeviteble traveturis dufoje . Ĉu pli granda solidareco inter la eŭropaj landoj ne urĝas ? Kial miri pri la problemoj de la tutmondiĝo ?


Survoje ni miris pri iuj eksterordinaraj kaj ne atenditaj spektakloj : gregoj da cikonioj sur la ebenajoj de norda Pollando aŭ centoj da ventmotoroj en la Danuba valo, inter Bratislava kaj Vieno .

Kompreneble restas en Eùropo grava lingvoproblemo kaj tuj post forlaso de Germanio, oni ege sentas la malfacilecon sin komprenigi, eĉ en la germana aŭ la angla .
 Por fini, kelkaj fotoj pri la eùropa bunteco : la mirinda astronomia horloĝo sur la centra placo de Prago (Ĉeĥio), ligna domo en Zakopane (suda Pollando en la Tatra montaro, proksime de la slovaka landlimo)...




... kaj laste pri Trakai en Litovio, eble la loko, kiun mi persone plej ŝatis dum la ekskursoj, certe pro la koloroj, la ruĝo de la tegmentoj (imagu, ke en la kvindekaj jaroj, tiu fortreso sur insulo estis ruinigita), la malhela bluo de la akvo kaj la hela bluo de la ĉielo. Sed la Litovoj renaskis la imponan kaj pluretaĝan fortreson .
 Plurfoje oni diris al mi, ke pri turismo la regiono de Montpellier (UK 98) estis nekompareble pli riĉa (kokeriko !). Ni nesciis tion, kio atendis nin dum tiu vojaĝo . Ni ne bedaŭras la entreprenon kaj pluraj el ni jam pretiĝas por la UK de Florenco (certe) kaj Jokohamo (eble) ! Ĉu vi ne partoprenos ? Ĝis !

JH



En la distanco, la kastelo de Trakai

Fotoj de Jean Hénin, krom la lasta .



Ekonomika analizo malkonsilas la anglan

La profesoro de la Ĝeneva Universitato kaj specialisto pri lingvoekonomiko François Grin publikigis ampleksan dosieron, kie li analizas la lingvan politikon de Eŭropa Unio. La studon petis kaj eldonis la Alta Konsilio pri Taksado de la Instrusistemo [- france: Haut Conseil de l'évaluation de l'école -], franca publika organizaĵo aŭtonoma, kiu taksas kaj analizas la staton de instruado en Francio.

La informo starigas la demandon, kiu estus la optimuma elekto pri la laborlingvoj en Eŭropa Unio. Por tion fari, ĝi studas la nunan situacion kaj konkludas, ke la enspezoj, kiujn Britio ricevas de la superregado de la angla en la mondo, kaj ankaŭ en Eŭropa Unio, estas 17-18 miliardojn da eŭroj jare, t.e. 1% de ĝia malneta nacia produkto. Tiun kvanton ĝi ricevas el la vendado de libroj kaj de aliaj varoj ligitaj al la angla lingvo kaj el la 700 000 homoj ĉiujare vizitantaj Anglion por lerni la lingvon, krom ankaŭ el la ŝparoj devenantaj de la neglektado de la fremdlingva instruado en la britaj lernejoj. Ne temas pri la tuto de la ekonomiaj transpagoj al la Unuiĝinta Reĝlando pro lingvaj kaŭzoj, sed pri 75 % el ili, kion la aŭtoro estimas kiel frukton de la hegemonio de la angla kaj ne nur de la demografia pezo de la lingvo mem. El tio rezultas, ke ĉiu el el 280 milionoj da ne-anglalingvanoj de la Unio jare subvencias per 65 eŭroj la britan ekonomion.

Kvankam tiuj nombroj estis jam publikaj inter specialistoj, mankis analizo, ĉu tiuj kostoj estus pli malaltaj, se oni elektus aliajn eblecojn, kiel tiujn, kiujn la studo formulas. Per la plilarĝigo de la Komunumo al 25 landoj en la pasinta jaro, la oficialaj lingvoj kreskis de 11 al 20, kaj fariĝis 21 per la ĵusa akcepto de la irlandana - sed ne de la kataluna. Tio starigas dubojn pri la egaleca politiko inter la ŝtataj ↗

Finaj notoj

La dosieron eblas elŝuti el: [rapport_Grin.pdf]
Biografiaj notoj pri prof. Grin:
[francoisgrin.html] (fr)
[francoisgrin_eng.html] (en)
Vivprotokolo de prof. Grin:
http://www.mic.unisi.ch/grin_cv.pdf

lingvoj de Eŭropa Unio, establita en la tempo de ĝia fondo, kiam ili estis nur kvar, kaj pensigas pri sistemo kun unu aŭ kun malgranda grupo de laborlingvoj, kiu iom post iom ŝajne sin trudas.

Esperanto la ebleco plej efika kaj justa

La svisa ekonomikisto proponas komparon inter tri eblaj scenaroj: la angla kiel sola lingvo, trilingveco angla-germana-franca kaj la elekto de esperanto kiel interna laborlingvo en la uniaj organoj. La unua ebleco pligrandigus la ekonomiajn transpagojn al la anglosaksaj landoj. Male, la studo konkludas, ke la trilingva ebleco havas koston similan al la unua, sed kun pli granda egaleco.

Tamen ĝi konsideras, ke ĝi lamas pro "ioma malstabileco" kaj ke ĝi postulas konsiderindan kvanton da rimedoj por efektiviĝi ĝin.

La tria ebleco, esperanto kiel sola interna laborlingvo, aperas, kun granda diferenco, kiel la plej malmultekosta kaj egalrajta. La ŝparojn oni atingus per du vojoj. Unuflanke, la simpleco de esperanto permesus malpli investi en la instruado de fremdaj lingvoj - kvankam la studo antaŭvidas la lernadon de dua fremda lingvo en la lernejoj de ĉiu membroŝtatoj, inkluzive de la Unuiĝinta Reĝlando - kaj, aliflanke, ĉar ĝi estas nenies lingvo, la varojn kaj servojn ligitajn al ĝia instruado oni povus egale produkti en ĉiuj landoj, kio kreus valoron en ĉiuj.

Profesoro Grin mallonge analizas ankaŭ la realigeblon de ĉi tiu tria ebleco, kiun li konsideras "neefektivegebla en mallonga tempo", sed ebla en la daŭro de unu generacio. "85% de la loĝantaro de la Eŭropo de la 25 havas en tio rektan kaj evidentan intereson, sendepende de la kulturaj kaj politikaj riskoj kuntrenataj de la lingva hegemonio", li asertas.

Kataluna Esperanto-Asocio : kea@esperanto-ct.org
www.esperanto-ct.org

Partopreno de prof. Grin en la 10a Linguapax-Kongreso (Barcelono, 2004):
<http://www.linguapax.org/congres04/indexcat.html>
Haut Conseil de l'Évaluation de l'École:
<http://cisad.adc.education.fr/hcee/>

la DEP) de lycéens étudient une troisième langue étrangère, et que 11% des élèves inscrits en BEP, CAP ou Bac professionnel en étudient une deuxième. Comme il est probable que ces deux derniers effets excèdent le second, notre estimation finale du coût total de l'enseignement des langues étrangères en France, soit environ € 8,235 md, est sans doute légèrement en dessous de la réalité. Le détail des estimations est fourni dans le tableau 3.

TABLEAU 3 : ENSEIGNEMENT DES LANGUES ÉTRANGÈRES EN FRANCE
(PRIMAIRE : 1999-2000 ; AUTRES : 2003-2004)

ANNÉE SCOLAIRE	PART HORAIRE DES L.E.	DÉPENSE/ÉLÈVE	EFFECTIFS	DÉPENSE TOTALE
CP	0,058	261,3	783532	204736911
CE1	0,058	261,3	822422	214898868
CE2	0,067	304,9	797725	243226352
CM1	0,067	304,9	793648	241983275
CM2	0,067	304,9	801511	244380703
Total primaire				1.149.226.111
Total primaire ($\times 1.024$)⁷²				1.176.807.538
Sixième	0,148	1058	821653	869308874
Cinquième	0,135	965	801084	773046060
Quatrième	0,123	1630	818337	1333889310
Troisième	0,105	1509	794116	1198321044
Total Collège				4.174.565.288
Seconde	0,193	1882	533489	1004026298
Première	0,158	1540	487872	751322880
Terminale	0,147	1433	489111	700896063
Total Lycée				2.456.245.241
BEP/CAP/Bac Pro	0,061	614	695452	427007528
Total BEP/CAP/Bac Pro				427.007.528
Dépense globale (€)				8.234.625.595

Sources : donnée DEP (Direction de l'évaluation et de la prospective), (<http://www.education.gouv.fr/stateval/default.htm>) et programmes et grilles horaires des différentes filières du système scolaire français, programmes et grilles horaires disponibles sur le site pédagogique du ministère de l'éducation nationale (<http://eduscol.education.fr/>). Chiffres pour l'année 2003-2004 s'agissant du secondaire (Collège, Lycée et Second cycle professionnel) et pour l'année 1999-2000 s'agissant du primaire. Correction chiffres primaire : compte tenu de l'accroissement démographique de 2,4% entre 1999-2000 et 2003-2004.

Les données valant pour 2004 (ou ayant fait, dans le cas du primaire, l'objet d'une extrapolation pour 2004 à partir des données de 1999), il convient de diviser le montant total obtenu de € 8.234.625.595 par la population résidente de cette même année⁷³, soit 59.900.700, pour obtenir une dépense par habitant et par an, pour

⁷² Compte tenu de l'accroissement démographique de 2,4% enregistré entre les années 1999-2000 et 2003-2004.

⁷³ Source :

<http://epp.eurostat.cec.eu.int/portal/page? pageid=1996,39140985& dad=portal& schema=PORTAL>

TABLEAU 5 : TRANSFERTS ANNUELS NETS EN FAVEUR DU ROYAUME-UNI
MILIONS D'EUROS, 2002-2004

POSTE	MONTANT DIRECT	EFFET MULTIPLIFICATEUR ^a OU RENTE DÉGAGÉE
Marchés privilégiés	1.875	5.156 à 6.750
Économie d'effort pour la traduction et l'interprétation	2.200	154
Économie dans l'enseignement des langues étrangères	6.000	420
Total	10.075	5.730 à 7.324

a : Dans les cases où figurent deux montants, le premier résulte de l'application d'un multiplicateur de 2,75 au montant direct estimé ; le second est basé sur le montant total rapporté par Phillipson après ajustements (2003 : 77).

En termes de rentrées nettes ou de dépenses évitées (« Montant direct » dans le tableau 5), la préséance actuelle de l'anglais rapporte actuellement au Royaume-Uni plus de 10 milliards d'Euros annuels.

Par contre, on pourrait aussi se baser, pour l'estimation des marchés privilégiés, non pas sur le montant direct des dépenses évaluées sur la base des informations du British Council, mais sur l'estimation officielle du gouvernement britannique (soit quelque € 13 md au début des années 2000, qui représenteraient sans doute plus de € 15 md actuellement, mais que nous avons proposé d'évaluer, très prudemment, à € 6.75 md au titre des marchés *privilégiés* dans un contexte spécifiquement *européen*). Pour prendre la pleine mesure des avantages que retire le Royaume-Uni de cette situation, on peut en outre rappeler que les montants épargnés sur la communication et sur l'enseignement des langues étrangères dégagent une forme de rente annuelle de l'ordre de 574 millions d'Euros. Dans ce cas, le montant total de la valeur que représente actuellement, pour le Royaume-Uni, la préséance de l'anglais, est de l'ordre de € 17,399 md. Là aussi, l'estimation reste basée sur une utilisation prudente des données disponibles

On peut donc raisonner avec une fourchette allant de 10 à 17 milliards d'Euros annuels, selon que l'on tient compte ou pas d'effets multiplicateurs et du rendement des montants que le principal pays anglophone d'Europe peut actuellement économiser. À titre de comparaison, le budget du gouvernement central britannique s'élevait, en 2003-2004, à quelque 400 milliards de livres⁷⁸, soit environ 584 milliards

⁷⁸ Source : <http://www.statistics.gov.uk/pdfdir/psa0604.pdf>.

d'Euros. Le PIB nominal britannique s'élevait en 2004, quant à lui, à environ 1710 milliards d'Euros⁷⁹ ; environ 1 % de ce total est donc imputable à la dominance actuelle de l'anglais.

Ces ordres de grandeur doivent, rappelons-le, s'entendre non compris tous les effets symboliques, des effets induits sur la diffusion de biens et services culturels en langue anglaise, et de la position privilégiée dont jouissent les locuteurs natifs de l'anglais dans les situations de négociation et de conflit, ce qui est inévitablement à l'origine d'autres bénéfices financiers. Cet état de fait est financé par les autres États, notamment européens (rappelons qu'on a tenté, dans les pages qui précèdent, de ne prendre en compte que les flux qui apparaissent dans le contexte des échanges intra-européens), qui acceptent en outre, pour cela, de doubler leurs factures nationales pour l'enseignement des langues étrangères.

L'hégémonie linguistique est donc, sans aucun doute possible, grossièrement inéquitable. Rappelons à nouveau que ce n'est nullement la langue anglaise en tant que telle qui est en cause, mais bien l'hégémonie linguistique comme mode de fonctionnement, quelle que soit la langue au bénéfice de laquelle elle s'est établie. Il serait donc curieux de souhaiter la renforcer, comme le suggèrent tous ceux qui proposent d'accorder à une langue nationale (anglais ou autre) un statut de ce type.

Un tableau synoptique (Tableau 6) permet de comparer d'un coup d'œil les différentes options. Pour ce tableau, nous ne prenons en compte que la colonne des « montants directs » du tableau 5.

⁷⁹ Source :

http://epp.eurostat.ec.eu.int/portal/page?_pageid=1996,39140985&_dad=portal&_schema=PORTAL&_screen=detailref&language=fr&product=Yearlies_new_economy&root=Yearlies_new_economy/B/B1/

TABLEAU 6 : COMPARAISON ENTRE TROIS SCÉNARIOS
(Montants en millions d'euros arrondis à l'unité supérieure)

SCÉNARIO ET ENVIRONNEMENT LINGUISTIQUE	CARACTÉRISTIQUES GÉNÉRALES	LANGUES ÉTRANGÈRES À ENSEIGNER	DÉPENSES D'ENSEIGNEMENT DES LE	TRANSFERTS VERS LE PAYS À LANGUE HÉGÉMONIQUE	CONTRIBUTION FRANÇAISE (13%) AUX TRANSFERTS	COÛT NET PAR RAPPORT AU SCÉNARIO 3
Scénario 1 : « Tout-à-l'anglais »	Communication interlinguistique essentiellement en anglais ; inégalités en faveur des locuteurs natifs de cette langue ; risques accrus d'érosion à terme de la diversité linguistique et culturelle.	1 ^o LE : anglais 2 ^o LE : toute autre langue	8.235	10.075	1.310	5.428
Scénario 2 : « Plurilinguisme »	Communication interlinguistique en diverses langues européennes, gravitant vers un petit nombre de « grandes » langues, notamment les trois langues privilégiées par hypothèse (anglais-français-allemand) ; diversité linguistique et culturelle plus affirmée, mais risque d'instabilité entraînant la nécessité de mesures ciblées pour favoriser les contextes communicationnels en langues non-dominantes, particulièrement en langues autres que l'anglais.	1 ^o LE (pour la France) : anglais ou allemand * 2 ^o LE (pour la France) : n'importe laquelle * <i>Rem. 1 : L'une des deux LE devrait être une langue latine</i> <i>Rem. 2 : Dans le cadre de cet enseignement, développer la compétence réceptive dans les autres langues latines</i>	8.235	négligeable	0	4.118
Scénario 3 : « Espéranto »	Communication interlinguistique essentiellement en espéranto ; égalité quasi complète entre locuteurs quelle que soit leur langue maternelle.	1 ^o LE : espéranto 2 ^o LE : n'importe laquelle	4.118	0	0	0

* : pour les pays dont les résidents n'ont en majorité ni l'anglais, ni le français ni l'allemand comme langue maternelle, la première et la deuxième langue étrangère enseignées devraient, pour assurer que le scénario 2 assure l'intercompréhension au même titre que les deux autres scénarios, provenir du trio anglais-français-allemand.

Quelques commentaires peuvent aider à interpréter ce tableau.

- ◊ Le net avantage du scénario espérantiste ne doit pas surprendre, puisqu'il reflète à la fois l'efficacité de cette langue et son équité sans pareille. *La prise en compte de l'équité* dans le classement des scénarios devrait donc amener à retenir le scénario 2 ou 3. En effet, si le principe de différence rawlsien s'entend sous réserve d'une certaine garantie d'efficacité, on voit que celle-ci n'est aucunement servie par le scénario 1.
- ◊ *La prise en compte des valeurs non-marchandes* amènerait à renforcer l'attrait du scénario 2, car celui-ci favorise la visibilité quotidienne de la diversité des langues et des cultures ; en revanche, il accuserait les défauts du scénario 1, car c'est celui qui fait courir les plus grands risques d'uniformité.

- ◊ *La prise en compte explicite et séparée de dimensions symboliques, liées à l'ancrage historique et politique des cultures européennes (et dans la mesure où de telles dimensions n'auraient pas pu être saisies par le biais des valeurs non marchandes), renforce ces conclusions.*
- ◊ Les montants évalués ici portent sur une année de calendrier ; ils s'additionnent d'année en année, et renforcent une dynamique de plus en plus difficile à renverser, et dans laquelle ces montants eux-mêmes pèseront de plus en plus lourd.

Si le scénario du « tout-à-l'anglais » se révèle, vérification faite, le plus coûteux et le moins équitable des trois, comment se fait-il qu'il continue à recueillir une telle adhésion ? Comment expliquer qu'une alternative préférable au plan de l'efficacité et de l'équité ne soit jamais sérieusement envisagée ? Quelles orientations peuvent-elles être envisagées à court et à long terme, compte tenu des résultats obtenus jusqu'ici ? Telles sont les questions qu'aborde le septième et dernier chapitre.

AVIS DU HAUT CONSEIL DE L'ÉVALUATION DE L'ÉCOLE

QUELLE POLITIQUE LINGUISTIQUE POUR QUEL ENSEIGNEMENT DES LANGUES ?

(L'avis complet du HCéé – 4 pages – peut être demandé à SFS). *Quelques précisions sur cet avis.*
Le Ministre de l'Éducation Nationale a demandé au HCéé de formuler un avis sur l'enseignement des langues étrangères et plus particulièrement sur le statut de l'anglais. Le HCéé a demandé à François Grin, professeur à l'université de Genève et directeur-adjoint du SRED (Service de la recherche en éducation du canton de Genève) de lui présenter une étude sur *l'enseignement des langues comme politique publique*. Il est rappelé que le rapport n'engage pas le HCéé et peut être consulté à <http://cisad.adc.education.fr/hcee>, rubrique publications.

Question posée : faut-il laisser jouer la « dynamique des langues » ? L'évolution rapide en défaveur du français est rappelée. Plus loin sont rappelées les conséquences pratiques de l'hégémonie linguistique.

// Pour prendre la mesure des effets de cette « dynamique des langues » et de ses conséquences sur l'usage des autres langues – notamment le français – dans la communication européenne, on peut rappeler qu'en 1997, anglais et français avaient la même part dans la rédaction originelle des documents du Conseil de l'Union européenne (41 et 42 % respectivement). Six ans après en 2002 (donc avant l'élargissement de l'Union européenne) la part de l'anglais était quatre fois supérieure à celle du français (73 % contre 18 %).
cette hégémonie se traduit par les conséquences suivantes :

- Une position de quasi-monopole sur les marchés de la traduction et de l'interprétation vers l'anglais, de la rédaction de textes en anglais, de l'enseignement de l'anglais et de la production de matériel

pédagogique pour son enseignement ;

- Une économie de temps et d'argent dans la communication internationale pour les anglophones, alors que les locuteurs non-natifs doivent tous faire l'effort d'apprendre l'anglais, de s'exprimer en anglais et d'accepter des messages émis dans cette langue ;
- Une économie de temps et d'argent pour les anglophones, qui n'ont guère d'effort à faire pour apprendre d'autres langues ;
- La possibilité pour les anglophones d'investir dans d'autres domaines les ressources qu'ils n'ont pas besoin de consacrer à l'apprentissage des langues étrangères ;
- Une position dominante des anglophones dans toute situation de négociation, de concurrence ou de conflit se déroulant en anglais.

Existe-t-il une politique linguistique plus économique que le tout-anglais ? Réponse : deux scénarios.

// Un premier scénario est le **plurilinguisme, défini comme un régime linguistique qui suppose que la communication intra-européenne est organisée de façon telle qu'elle se déroule effectivement dans plusieurs langues**, et qu'il est ainsi mis fin à l'hégémonie de l'anglais.

Un second scénario peut constituer une référence théorique : c'est celui dans lequel **une langue qui n'est celle de personne, donc celle de tout le monde, comme voulait l'être l'espéranto, serait adoptée comme langue de communication internationale.**

Du point de vue économique, pour notre pays, comme pour tout pays non anglophone de l'Europe, ce dernier scénario serait incontestablement le meilleur : il éviterait tous les transferts inévitables auxquels donne lieu le « tout-à-l'anglais » puisque chacun devrait consentir un effort symétrique pour traduire et interpréter entre la langue de communication internationale et sa langue maternelle, et il impliquerait des coûts d'enseignement moindres, l'apprentissage d'une telle langue étant plus aisé et plus rapide que celui de l'anglais et de tout autre langue. ♪

Mais un scénario alternatif n'est envisageable que si la France n'est pas seule à l'appliquer et le HCéé se limite au premier scénario, en passant sous silence le second ! Ce qui le conduit à prôner un plurilinguisme véritable et proposer

//

- que dans la logique de cette position, elle promeut l'enseignement d'au moins deux langues vivantes étrangères pour tous les élèves, en modulant l'offre compte-tenu, notamment, des voisinages régionaux et en assurant la continuité de cet enseignement tout au long de la scolarité ;
- que l'enseignement de toutes les langues vivantes étrangères soit plus orienté sur la communication orale et écrite qu'il ne l'est aujourd'hui, sans négliger pour autant ce qui, dans cet enseignement, contribue à développer la dimension culturelle du plurilinguisme.
- que la France continue à ne donner ni caractère obligatoire, ni primauté à l'enseignement de l'an-

glais,¹¹ ce qui n'aurait de toute façon guère de conséquences pratiques puisque la plupart des élèves l'apprennent déjà, mais ce qui aurait des conséquences politiques particulièrement importantes puisque notre pays cautionnerait et renforcerait ainsi l'hégémonie linguistique vers laquelle tend l'Europe ;

- que la France, qui doit affirmer sa volonté de s'opposer au monopole d'une seule langue de communication internationale, s'emploie à démontrer à ses partenaires l'intérêt qu'ils auraient, comme elle, à se donner les moyens de promouvoir un plurilinguisme effectif en Europe, afin de ne pas subir les effets négatifs du « tout-à-l'anglais » ♪

Un départ intéressant mais une chute pass-partout, éloignée de celle du Pr Grin ...

Diversaĵoj

IJK = Internacia Junulara Kongreso

Ĝi disvolviĝis tuj post la UK en Zakopane (Suda Pollando). Partoprenis pli ol 500 gejunuloj. Bona etoso, nur la vetero estis iom malseka (Zakopane estas en montara regiono!). Oni legis dum la inaŭguro la salutojn de la Prezidento de Pollando. Malgorzata Handzlik, EU-parlamentanino, prelegis (ŝi ne povis veni al Vilno), ankaŭ la konata japana mecenato Etsuo Miyoshi.

Unesko

Koichiro Matsuura, ĝenerala direktoro de Unesko sendis mesaĝon al la UK de Vilno. En la fina para-grafo li « invitas la partoprenantojn de la kongreso labori kun Uea kaj Unesko por antaŭenigi plurismon, el kiu fontos interŝanĝoj kaj kreemo, kiuj favoros kulturajn interŝanĝojn, kaj helpos la komunan kunvivadon de homoj kaj de grupoj kun malsamaj kulturaj identecoj ».

Nitobe-simpozio en Vilno

Ĝi okazis tuj post la UK kaj pridebatis la problemojn de la agnosko de 21 lingvoj en EU. Partoprenis lingvistoj, fakuloj pri lingvopolitiko, ministroj, EU-parlamentanoj, diplomatoj el pli ol 30 landoj. Estis advokatoj de la angla lingvo, de mult-lingvismo kaj de E^o (partoprenis Profesoro Grin). En la konkluda dokumento estas indikite, ke la kondiĉo por procezo de eŭropa unuiĝado postulas justecon, demokratecon kaj altkvalitan komunikadon inter la eŭropanoj kaj ke nune la lingvoj de la malgrandaj ŝtatoj kaj de minoritatoj estas minacataj. Estas ankaŭ rekomendo esplori la eblan rolon de E^o en la lingva kadro de EU.

Vidpunktoj

Fine de oktobro aperis en "Lietuvos aidas", ĉiutaga gazeto de Litovio, komuniko pri la Nitobe-simpozio Ĝia titolo: la estonteco de Eŭropaj lingvoj estas minacata. En la sama gazeto aperis pli frue la konkluda dokumento de la simpozio.

Pri tiu simpozio ankaŭ sin esprimis (en alia gazeto) du litovaj EU-parlamentanoj, laŭ kiuj ne estas logike lerni esperanton ...

La lingva kaj kultura diverseco estas atuto por Eŭropo sed tiu babelturo povas malebligi al ĝi fariĝi la ekonomia superpovo, kiu ĝi devus esti.

Tia estas la konkludo de longa artikolo aperinta la 26an de oktobro kaj havebla ĉe SFS en usona « Georgetown independent ». Ĝi mencias la intencon de Jan Figel (estro de komisiono pri kulturo ĉe EU) starigi eŭropan agentejon por la defendo de la lingva diverseco kaj la lernado de lingvoj.

Sveda esperantisto skribis al samlandanino Margot Wallström kaj demandis ŝin pri E^o. La letero finfine alvenis ĉe Sro Figel, kies kabinetestro


respondis...en la angla...ke lingvo estas parto de multkultura socio kaj de kultura diverseco. Pro tio la avantaĝoj de iu lingvo ne taŭgas por la komisiono kaj la proponita lingvo (li eĉ ne nomis ĝin!) ne havas denaskajn parolantojn kaj ne estas ligita al iu vivanta kulturo.

Ĉu inviti tiun kabinetestron al la UK de Florenco?

Kunveno pri plurlingvismo (Assises du plurilinguisme). Ĝi okazos fine de novembro en Parizo. Pluraj esperantistoj sin proponis por interveni en la programo aŭ prelegi sed estis rifuzitaj. Robert Phillipson, kies libroj estas konataj de la esperantistoj, prelegos pri la temo: ĉu la ekspansio de la angla en kontinenta Eŭropo estas minaco por la aliaj lingvoj? La dupaĝa teksto en la angla de lia prelego estas jam havebla (ĉe SFS).

Afero Gems (vidu la lastan SFS)

Temas pri firmao en la pariza regiono, kie la 1500 salajritoj devas labori en la angla. La juĝo estas prokrastita ĝis januaro 2006.




Saltotabulo al lingvoj

« Springboard » (saltotabulo) havos budon en la lingvosalono de Olympia (Londono) komence de novembro. Temas pri programo, kiu kondukas per esperanto al la aliaj lingvoj. Ĝi ankaŭ taŭgas por nefaka instruisto de lingvoj en bazlernejoj.

Argumento uzata por tiu solvo: kiam oni instruas flutludadon al ĝelernantoj, tio ne signifas ke poste ili ĉiuj estos profesiaj flutistoj sed tio helpas ilin por posta ludado de alia instrumento.

Lernejoj, kiuj adoptos « Springboard », ricevos tre kompletan pakadon (vidu poste).

Ĉu ne imitinde en Francio?



Instruiloj

Laŭ la retejo www.edukado.net instruiloj de E^o (lernolibroj, vortaroj, ktp) estas troveblaj en 36 lingvoj: 43 nur en esperanto, 31 en la litova, 26 en la angla, 21 en la germana, 16 en la franca, 14 en la hungara, 9 en la rusa... La katalogo donas detalojn pri ĉiu libro kaj en la rubriko « nia opinio » eblas taksii la libron (1 ĝis 5 steloj).

+ vortaro

Praktikaj informoj

Zamenhof-tagoj

Aldone al la Z-tagoj de Montpellier (3/12) kaj Béziers (10/12), menciindas la Z-tagoj en Tuluzo (la 10an de decembro) kaj (verŝajne) en Avinjono la 11an de decembro. Pri Tuluzo, matene inter la 10a kaj 12a h estos la kunveno de la federacio (Midi-Pyrénées), sekvos komuna tagmanĝo en restoracio kaj posttagmeze spektakloj (muziko, teatraĵoj...). Loko: Maison de Quartier Arènes Romaines 107, Avenue Arènes Romaines 31300 Toulouse

FRINGOJ

Festa Renkonto Internacia de GeknabOJ

Kiam? De la 15a ĝis la 22a de aprilo 2006
Kie? En la kastelo de Grezjono www.gresillon.org
Por kiu? Por infanoj kaj gejunuloj inter 6 kaj 18 j. Kompreneble akompanantoj estas bonvenaj.
Kio? La jam fiksita programo celas plialtigon de la lingva nivelo sed unue la preparadon de granda festo kun spektakloj, ludoj, ekspozicioj (laŭ la ŝatoj de ĉiu).
Kiu? Elizabeth Barbay 01 48 47 23 87
25, allée Gabriel Fauré 93140 Bondy
eliz.babay@wanadoo.fr

Muziko de la insulo Mauricio

Mary-Jane Gaspard, jam konata pro la albumo "simplement camarade" (nur amiko) en la kreola lingvo, kantas nun en esperanto. La familio Gaspard turneos en Eŭropo en decembro. Ilia spektaklo estas fascina folkloro evento kun multaj koloroj, kiun riĉigas la apero de dancistinoj, prezentantaj la segao-dancon de Mauricio. Post kelkaj minutoj de spektaklo, la publiko ekkun-dancas... Esperanto-grupoj, kiuj deziras organizi spektaklon kun tiu nova koloro en esperantujo, anoncu sin rapide al <http://www.madir-music.com/kontaktoMMP.php>

Du novaj libroj pri E^o en la franca

-L'E^o, un nouveau latin pour l'église et pour l'humanité
-L'E^o, une valeur culturelle, suivi d'une histoire de la littérature en langue internationale
La unua estas traduko de « E^o, la nova latino de la eklezio », kiu jam aperis en la angla kaj la germana. Pli precize estas adapto de la menciita libro, ĉar duoble pli ampleksa. La 6a ĉapitro (77 paĝoj) « Faktoj kaj argumentoj » estas ia daŭrigo de « la defio de la lingvoj » de Claude Piron kaj ege utilos por konvinki homojn. Du suduloj kunlaboris por tiu nova eldono...
Prezo: 12^E + afranko ĉe www.retbutiko.net (rabato de 33% ekde mendo de 3 ekzempleroj).
La dua libro montras la riskon de malapero de kulturoj kaj lingvoj pro konata hegemonio kaj la solvon de esperanto.
Prezo 6E + afranko (16% rabato ekde tri ekz.)

Kurso de esperanto

« ¿Sabe Usted Esperanto? » estas argentina kurso en 20 lecionoj, iom klasikaj, por komencanto aŭ eĉ progresanto. www.geocities.com/sue_hess/

Agoravox: "le journal media citoyen"

Sur la retejo www.agoravox.fr vi trovos informojn kaj debatojn pri diversaj temoj, ankaŭ pri esperanto, ekzemple pri la projekto ITV de televido sen limoj (al ĝi mankas ankoraŭ iom da mono por ekfunkcii), pri la projekto AKEL de komunikado inter lernejoj (Alternativa Komunikado inter la Eŭropaj Lernejoj) www.esperanto.web.pt/akel/, pri E^o sur la reto, ktp

Jarfine en Esperantio

Ne mankas eblecoj, ekzemple en Pollando en Zakopane (Tatra montaro), dank'al la teamo, kiu organizis la Junularan Kongreson. Nomo de la aranĝo: Novjara ago-semajno (27 XII-3 I) <http://www.aso>

Estas anoncataj ankaŭ renkontoj en Germanio:

-Novjara renkontiĝo en Frankfurt am Main de la 28a de decembro ĝis la 8a de januaro: kursoj, prelegoj, ekskursoj, spektakloj, silvestra festo. La temo estos mezepoko www.esperantoland.org/nr
-IF: tradicia jarfina aranĝo en Trier, la plej malnova urbo en Germanio (restaĵoj de la Romianoj). La aranĝo estas por lingve spertaj personoj, paralela porinfana programo www.internacia-festivalo.de
-ICH (Interkultura Centro Herzberg) proponas vintrosportsemajnon de la 4a ĝis la 8a de januaro en la Harz-montaro. Estos « variprograma trejnsemajno por via fizika-psika bonfarto kaj sano ». www.ic-herzberg.de www.esperanto-zentrum.de (notinde, ke ICH funkcias la tutan jaron)
kaj fine, iom poste, se vi revas pri altaj montoj, la 6a internacia himalaja renkontiĝo, organizata de la Nepala E^o-asocio atendas vin de la 26a de februaro ĝis la 10a de marto 2006. La unuajn kaj lastajn tagojn oni pasigos en la Katmando-valo, poste 200km okcidente oni grimpos iom post iom ĝis preskaŭ 4000 metroj, piede de la himalaja montaro. La kotizo estis kalkulita por kovri kostojn, ne por gajni monon. www.esperantonepal.com

